

Manfred Hausmann,  
La kantistino

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Aŭskultas gastoj senmoveme  
al hela fluto-melodi'.  
Sur la genuon heziteme  
demetas la liuton ŝi.

La fajnajn brovojn ŝi volbigas,  
silentas flutoj ĉie ĉi.  
Nun siajn fingrojn ŝi ondigas,  
dum belan kanton kantas ŝi.

La frunton levas ŝi, plongite  
en sian ludon revas ŝi.  
El la okuloj jen subite  
rompiĝas brilo de ebri'.

Malhelas jam, la gastoj iras,  
revenas iu vir' al ŝi.  
Pri feliĉego sia miras,  
ektimas tamen ŝi kaj li.

*Traduko de la Germana poemo "Die Sangerin" de MANFRED HAUSMANN (\*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-928-1861 (2013-10-04 22:14:08)*

Manfred Hausmann,  
Die Sangerin

Die Gaste lauschen ohne Regung  
der hellen Flotenmelodie.  
Mit einer zogernden Bewegung  
legt sie die Laute auf ihr Knie

und wolbt die zarten Augenbogen,  
bis das Gewirr der Floten schweigt.  
Dann lasst sie ihre Finger wogen  
und singt das Lied, das fallt und steigt.

Sie hebt die Stirn, ins Spiel versunken,  
ein Ring lost sich von ihrem Ohr.  
Da bricht ein Glanz, von Sehnsucht trunken,  
aus ihrem Wimpern jah hervor.

Es dunkelt schon. Die Gaste gehen.  
Doch einer kehrt zu ihr zuruck.  
Sie sehn sich an, und tief im Sehen  
erschrecken sie vor ihrem Gluck.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas MANFRED HAUSMANN (\*1898-09-10 – †1986-08-06).*

*Arg-928-1860 (2014-04-07 17:45:58)*

*La poemo aperis en la libro "Hinter dem Perlenvorhang", Gedichte nach dem Chinesischen von Manfred Hausmann, Verlag S. Fischer, 1954. Pri la poeto vidu ankaŭ la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred\\_Hausmann](http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Hausmann). Manfred Hausmann verkis tiun ĉi poemon laŭ poemo verkita de la ĉina poeto Ho Sun.*